

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 65 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1988 - 3

(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... pri Aristotelo...



... kaj pri Kubo.

KULTURAJ KAJEROJ

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent B.P. 54
49150-Baugé

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo(A.Frangeul)	2
Pri Kubo	3-4
Aristotelo	5-6
La blinduloj en la antikva socio	7-8-9
Stranga sonĝo (P. B.)	10
Paĝo de geknaboj (onklino Gina)	11
Mi amas vi (kolektiva verko)	12-13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

Krom en aŭgusto, la vetero estis nur sufiĉe bona dum la somero. La barometro prefere ondis, rifuzante stabilecon. Du tri nub-grizaj tagoj sekvis du tri sunajn tagojn. Sed ĉiuj scias, ke tro konstante bela vetero, meze de agrabla kamparo, ne favoras studadon. Ni ankaŭ devas diri, ke kiam varmas ekstere ne nur la ombro de la arboj agrablas, sed ankaŭ la malvarmeta temperaturo interne de la klasĉambroj! Fakte ne gravas la kialo: ni konstatis, ke la ĉeestantoj ne nur ĉeestis, sed ankaŭ partoprenis. La kursoj renkontis sukceson, kiel la prelegoj. Multe interesis la staĝanoj la Cseh-seminario gvidata de Audrey Childs-Mee. Dennis Keefe estis devigata gvidi plian kurson por grupeto da Japanoj.Claude Piron aldonis tablojn kaj seĝojn por dece akcepti ĉiujn interesatojn. Ĉu allogis ilin la temo aŭ la ekridoj, kiuj aŭdiĝis en la tuta bieno? Ĉar ili verkis ridege!

Interesa estis ankaŭ la partopreno de multaj eksterlandanoj; ĝenerale pli ol la duono de la ĉeestantaro! Reprezentantoj de la kvin kontinentoj vizitis Gresillon. Tio ebligis la organizon de diversnaciaj vesperaranĝoj. Ni eĉ estis invititaj al hispana aperitivo, kun "tapas" kaj bonegaj vinoj.

Kompreneble ankaŭ venontjare vi povos ĝui vere internacian etoson dum la laboro kaj la distraj horoj. Nia programo por 1989 estos preta en novembro. Jam nun petu ĝin!

Esperanto tra la Mondo

LA 73-a UNIVERSALA KONGRESO-

Ĝi kunigis en Roterdamo pli ol 2300 partoprenantojn el 60 landoj. La temo de la kongreso estis:"Sciencoj kaj teknikoj por internacia kompreniĝo." Simpatia mesaĝo estis sendita de S-ro Federico Mayor, ĝenerala direktoro de UNESKO. Inter la multaj kunvenoj, ni citu la "Tago de la Lernejo" dum kiu oni pridiskutis la lernejan politikon koncerne la oficialan enkondukon de esperanto en lernejojn.

La lastaj novaĵoj pri la starigo de la Monda esperanto-Centro Zamenhof en Bjalistoko estis grava ero de la kongreso. Tiu projekto estos verŝajne realigita en 1997.
Dum la antaŭa semajno okazis la Internacia Junulara Kongreso en Zagreb, kun 700 gekongresanoj el 46 landoj pri la temo:" Komunikado en la 21-a jarcento".

ESPERANTO-KURSO EN LA FRANCA RADIO-

Dank'al klopodoj de SAT-Amikaro, dissendo de kvinminuta kurso kaj de kanto okazis ĉiumonate, je la 9.45, de la 1-a de aŭgusto ĝis la 9-a de septembro, en la naciskala tre aŭskultata radiostacio "France-Inter". La instruanto estis juna anglo, Richard Comerford, kaj rolis kiel "lernantino" la radioparolistino Brigitte Vincent. Tiu elsendo sekvis alian tre sukcesan, la 1-an de junio, kiu vekis pozitivan reagon.

EL SOVET-UNIO- La konata soveta eldonejo Progress antaŭvidas, ekde 1989, la publikigon de libroj en la internacia lingvo. Planitaj libroj: "Trarompo", verkita de kolektivo de sovetaj kaj usonaj sciencistoj; "Oceano", vojaĝo sur la oceanoj de la planedo; "Komploto", pri la ribelo de la Decembristoj en 1825, k.t.p.

La redakcio de la tre interesa semajna gazeto "Moskovskije Novosti", kiu jam aperas en pluraj lingvoj, nun studas la eblecon eldoni ĝin ankaŭ en esperanto. Oni povas skribi al Yegor Yakovlev, Moskovskije Novostni, 16/1 Gorky str. Moskvo.

NOVAJ VORTAROJ- Post 24 jaroj de laboro aperis "Esperanta Bildvortaro", alinome la esperanta versio de la fama Duden-vortaro. Terminoj por 25 000 objektoj el la ĉiutaga vivo, troveblaj pere de 360 bild-kompleksoj kaj 194-paĝa vortindekso. Kompilis RUdiger Eichholz.

Dum la Internacia Kongreso de la esperantistaj Fervojistoj, oni prezentis la manuskripton de fervoja terminaro kun 10 204 fakvortoj kaj esprimoj.

En "El Popola Ĉinio", oni legis intervjuon de la aŭtoro de la laste publikigita esperanta-ĉina vortaro. Ĝi entenas 45 588 vortojn kaj entute, 1 600 000 ideogramojn.

INFANOJ KAJ ESPERANTO- "Infanoj ĉirkaŭ la Mondo" estas nove fondita asocio en Usono por interkonatigi infanojn en Usono kaj aliaj landoj pere de esperanto. Oni jam iniciatis kursojn por infanoj kaj instruistoj. Aperas revuo. "Children Around the World", 3876 Belmont Avenue, San Diego CA 92116 Usono.

Konstante aperas en Hungario la trimonata infana revuo:"Juna Amiko". Abonperantoj en ĉiuj landoj.

EL NORVEGIO- Nova eldono de la broŝuro "Norvegujo", reviziita, ĵus aperis kun 16 paĝoj da tekstoj kaj 8 paĝoj da bildoj. Ĝi estas senpage havebla: Norvega Esperanto-Ligo, Olaf Schousv.18,0572 Oslo

EL FRANCIO- La 15-an de Oktobro estos inaŭgurita en Cavaillon strato Zamenhof kaj, sammatene, en Fontaine-de-Vaucluse, plato honore al Petrarko. Por partopreni skribu al: A. Gente, 9 rue des Erables, 84000 Avignon. Vi ankaŭ povas skribi al la urbestroj: 84300 Cavaillon kaj 84800 Fontaine-de-Vaucluse.

EL ITALIO- "Esperanto Radikala Asocio" organizas duan surstratan manifestacion, je eŭropa dimensio, sabaton 8/10/ 88 por atingi, ke estu organizataj debatoj ĉe la televido pri la problemo de "unu oficiala eŭropa lingvo".

pri KUBO

Post du jaroj la Universala Kongreso de UEA okazos en Habana, ĉefurbo de Kubo. Tiuokaze certe aperos informoj, ĉefe pri la turismaj riĉaĵoj de la insulo. Nia intenco estas nur mallonge prezenti ĝian evoluon, ekonomian kaj politikan.

Kubo estas la plej vasta el la Antiliaj Insuloj. Ĝi estas 1200km longa kaj maksimume 80km larĝa. La plej alta monto estas Turquino kun alteco de 2150 metroj. La tuta surfaco estas de 114 500 km2. La lando, inkluzive de la ĉirkaŭaj insuloj, havas 8 milionojn da loĝantoj. Gi situas je nur 180 km. de Florido.

Pro tiu situo la insulo estis deziregata de multaj popoloj, unue el Eŭropo, Hispanoj kaj Angloj, poste el Nord-Ameriko. Tra la jarcentoj la Kubanoj serĉis sendependecon. Ili konstante batalis tiucele. En 1891 la poeto Jose Marti, poste nomata " apostolo de la sendependeco", diras al siaj samlandanoj:" Leviĝu per unu komuna impeto!" Tiu poeto, kun Maximo Gomez malfermis la batalon por liberiĝo. Fidel Castro, okaze de sia proceso en oktobro 1953 voĉlanĉis similan mesaĝon. En 1959, ankaŭ tiu alvoko okazigis la liberiĝon de Kubo disde Usono. De tiu epoko la ĉefoj de Kubo klopodis daŭre konduki sian revolucion apogante sin sur la popol-amaso.



La klimato de Kubo estas tiu de la malseka tropika zono: seka kaj malvarmeta en januaro, malseka kaj varma en julio, kun vegetaĵaro varia kaj abunda. La pejzaĝoj estas savantipaj kun disaj arboj kaj veprajoj. Sur nur 8% de la insulo, sur la montoj, staras arbaroj. La disvolvado de agrokulturo kaŭzis la malaperon de la antaŭaj tropikaj arbaroj sur la ebenaĵoj.

Antaŭ la revolucio de 1959, la ekonomio de Kubo baziĝis esence sur agrokulturo, ĉefe sur la kultivado de sukerkano. Usono aĉetis la sukeron, kontrolis la produktadon kaj vendis al Kubo manufakturaĵojn. Kubo havis preskaŭ neniun industrion. Post la agrikultura reformo, pli ol 100 000 kamparanoj fariĝis posedantoj de la grundo sur kiu ili laboris, po ne pli ol 68 hektaroj. Estis kreitaj 600 ŝtatfarmoj, sed pli ol 90% de la produktantoj ne estis kontrolitaj de la ŝtato. Koncerne la uzadon de la agrokultura materialo koopera sistemo estis starigita. Miloj da arboj estis plantitaj; kooperativoj de etaj fiŝkaptistoj estis kreitaj. Pro la plilongigo de la deviga stud-daŭro, mankis laboristoj sur la kampoj. La virinoj eniris la soci-ekonomian sistemon. La ekonomiaj kaj la sociaj strukturoj multe ŝanĝiĝis.

Kristoforo Kolombo diris: " Mi neniam vidis tiel belan landon". Li kredis, ke Kubo estas provinco de la Imperio de Granda Ĥan. Li nomis tiun teron "Juana", nomo de la filino de la reĝo. La tieaj Indianoj estis pacemaj. Ili rapide malaperis pro amasbuĉado, punlaborado kaj epidemioj. Nigraj sklavoj estis importitaj. Disvastiĝis la bredado de bestoj kaj la kultivado de tabakplantoj kaj de sukerkanoj. La Angloj ekokupis Kubon komence de la XVIIa jarcento. La loĝantoj, kiuj estis devigataj komerci nur kun Hispanio, ricevis la permeson libere komerci. Tiu decido ne ĉesigis incidentojn. La emancipada movado en la hispanaj kolonioj disvolviĝis en la Suda- kaj Centra Ameriko. Ekde 1820 miloj



da Kubanoj batalis por akiri sendependecon. De 1868 ĝis 1878 daŭris la tiel nomita " dekjara batalo ". Jam en 1854 Usono deklaris sian intencon aneksi la insulon. La Secesio-milito malhelpis la plenumadon de tiu deziro. Pro trudo de Usono la Madrida registaro promesis aŭtonomon al la insulanoj. Sed la Kubanoj postulis sendependecon. En 1898 pretekste de akcidento okazinta en la haveno de Habana, ekestis konflikto inter Usono kaj Hispanio.. La hispana ŝiparo estis detruita kaj, en decembro, la Hispanoj forlasis Kubon. De tiam regis usonaj guberniestroj La Kubo-konstitucio agnoskis la rajton de la Usonanoj interveni en Kubo por protekti la usonajn posedaĵojn, kontroli la impost-sistemon kaj okupi la havenon Guantanamo. Nur en 1934 Roosevelt enkondukis kelkajn ŝangetojn. Inter 1929 kaj 1932, por protekti la usonajn suker-produktaĵon, la usona registaro ne plu aĉetis la kuban sukeron. Kubo devis daŭre venigi siajn industri-bezonaĵoj de Usono.

Diversaj diktatoroj regadis. En 1952 Batista, kiu perforte fariĝis prezidento duan fojon, ne kontraŭstaris la transformadon de Kubo en paradizon por la usonaj gangsteroj. Homoj riĉiĝis tre rapide dum la pli multo terure malriĉiĝis. En 1958 Usono kontrolis 90% de la minejoj kaj de la kamparaj bienoj, kaj 40% de la suker-industrio. La 2-an de januaro 1959, la diktatoro Batista, venkita de la revoluciaj fortoj kondukitaj de Fidel Castro kaj Che Guevara, fuĝis al Sankta-Domingo. La unuaj decidoj de la novaj regestroj estis la batalo kontraŭ spekulado,, korupto, mon-ludoj. Alia ero de la programo estis la disvastigo de instruado. Fidel Castro iris al Usono esperante, ke li povos subskribi ekonomiajn kontraktojn. Sed la Usona registaro ne fidis lin kaj daŭre havis favoran rigardon al Batista. Revenante al Kubo Fidel Castro decidis komplete apliki la agrikulturan reformon: la bienoj apartenantaj al usonanoj estis disdonitaj al la kubaj kamparanoj.

Laŭ dokumentoj el

Encyclopaedia Univeŭsalis



ARISTOTELO

Metafizikisto, kosmologo, moralisto, logikisto, sociologo, retoro, eĉ matematikisto, Aristotelo resumas en sia verkaro preskaŭ la tutan scion de sia epoko. Plie li aldonis al tiu tuta scio novan branĉon: la studadon de la vivantaĵoj. Oni povas diri, ke li estas la patro de biologio.

La antikvaj filozofoj preferis studi la animon ol la vivon. Aristotelo observis la bestojn kaj la plantojn. Li havis la okazon renkonti fiŝkaptistojn kaj ĉasistojn, kiuj alportis strangajn bestojn. En Ateno estis modo ĉe la riĉuloj havi sovaĝajn bestojn hejme. El tiu materialo Aristotelo povis klasifiki, kompari por malkovri la "planon" de la naturo. Por li la naturo konsistigas la forton de ĉio. Ĉar ĝi estas esence didevena, ĝi estas perfekta. Li ripetadis:" la naturo neniam agas vane; nenion ĝi faras sencele ". La naturo faris palpebrojn por protekti la okulojn, kiuj estas fragilaj kaj humidaj; tia estas la okulo ĉar se la haŭto estus seka la okulo vidus nenion. Nur la homo estas postaĵ-hava besto, ĉar ĝi staras vertikale kaj la naturo igis la suban parton de la korpo peza. Jen elĉerpaĵo el lia verko " Partoj de la bestoj ". Ĉar la homo staras vertikale, li ne bezonis antaŭajn krurojn; pro tio la naturo anstataŭigis ilin per brakoj kaj manoj. Oni diras, ke pro siaj manoj la homo estas la plej inteligenta besto. Pli ĝuste estas diri, ke pro sia inteligenteco la homo posedas manojn. La mano estas ilo kaj la naturo ofertas tiajn ilojn al tiuj, kiuj kapablas uzi ilin. Oni donu flutojn al la flutistoj, ne devige intruu flutludadon al la flutposedantoj... La mano ne estas unu ilo sed iloj kaj la homo kapablas akiri grandan nombron da teknikoj dank'al tiuj donitaj iloj.

La naturo zorge organizis la mondon de la vivantaĵoj. La homo staras ĉe la supro de piramido, kies bazo konsistas el la plej simplaj tipoj. " La naturo iras grade de la senvivaj estaĵoj al la bestoj, tiel progresive, ke oni ne klare vidas iujn apartigajn limojn. La vegetaĵoj ŝajnas vivantaj kompare kun la senviva mondo sed tute senvivaj kompare kun la besta mondo....

En la maro ekzistas estaĵoj similaj al bestoj sed senmovaj, fiksitaj ĉe iu loko, kiel plantoj.


Tiu nocio de natura plano ekzistas ankaŭ interne de ĉiu specio. Ĉiuj vivantaĵoj estas konstruitaj ĉirkaŭ digesta tubo kun du ekstremoj: unu por la englutado de la nutraĵoj, la alia por la elpelado de la senutilaĵoj. La diferenco estas, ke ĉe la homoj kaj bestoj la engluta ekstremo situas ĉe la kapo, sed por la plantoj ĝi situas ĉe la piedoj.

Malantaŭ la malorda aspekto de la mondo sin kaŝas ordo, kiun oni povas trovi serĉante similecon inter la vivantaĵoj. Ĉar la granda kvalito de Aristotelo estis, ke la ekirpunkto de lia pripensado ne estis tute pretaj ideoj aŭ postulatoj, sed la studado de la faktoj. La klasifiko, kiun li imagis ne estis perfekta sed ĝi ankoraŭ pli malpli validas. Granda estis lia merito tiam diferencigi la balenon kaj la cetacojn disde la fiŝoj, la vespertoj disde la birdoj, ktp... En la "Historio de la bestoj" la leganto trovas multege da precizaj detaloj pri la anatomio kaj la moroj de la diversaj specioj. Li mirige priskribas la reproduktadon de la fiŝoj, de la birdoj kaj de la mamuloj. Dum jarcentoj "specialistoj" priridis kelkajn asertojn de Aristotelo kaj konfesis poste, ke li pravis.

Li priskribis ankaŭ la psikologian sintenon de la mamuloj. Ni legu, kion li skribis pri la femaloj. Oni ne forgesu, ke por Aristotelo ekzistis nur grada diferenco inter

homoj kaj bestoj, neniu esenca diferenco. " La femalo estas pli dolĉanima kaj maliceta ol la masklo, malpli simpla sed pli impulsiĝema kaj pli atentema je la edukado de la idoj... La virino estas pli kompatema kaj plorema; pli ĵaluza, plendema, insultema kaj batema. Ŝi pli rapide malkuraĝiĝas; ŝi estas pli senhonta kaj trompema; sed ŝi ankaŭ estas pli facile ekspluatebla kaj ŝia memoro estas pli fidela". Oni rajtas aprobi aŭ ne tiujn parolojn sed ni konstatas, ke ankaŭ nuntempe oni povas aŭdi similajn.

Kompreneble eraroj ne mankas en la verkoj de Aristotelo. Li diras, ke la supra makzelo de la krokodilo moviĝas. Sed estis danĝere alproksimiĝi sufiĉe por konstati, ke temas pri la malsupra! Laŭ Arsitotelo, testudo, kiu manĝis vipuron devas tuj manĝi origanon por ne morti; la sito scipovas kuracadi; la turto furzas dum ĝi movas la malantaŭan plumaron!



En libro titolita " Divenado dum la dormo" Aristotelo asertas, ke sonĝoj povas anonci malsanojn. "Ni pli facile preteratentas la internajn movojn, kiuj okazas dum la tago, krom se ili estas fortegaj. Dum la dormo eĉ malfortaj movoj perceptiĝas intense. Evidentas, ke la simptomoj, ne grandaj ĉe la komenco de malsano, pli klare montriĝas dum la dormo".


Fakte Aristotelo fondis la bazojn de la moderna scienco de la naturo: atenta observado, komparado, eksperimentado. Li malkovris la vastan strukturon de la mondo de vivantaĵoj, kiu baziĝas sur la "simplaĵoj" kaj kies krono estas la homo, la plej evoluinta besto.

Ni komprenas, kial Darwin skribis:" Linné kaj Cuvier estis miaj dioj; sed ili, apud Aristotelo, aspektis lernantoj"

El la libro

"Les bâtisseurs du Monde"

"La Mond-konstruintoj"



Li povas kapti ĉiun okazon

legi sian ŝatatan revuon

KULTURAJ KAJEROJ

ĉar li jam abonis ĝin.

Vidu adreson en Francio sur la unua kovrilpaĝo,

kaj la listo de niaj perantoj sur la lasta.

La blinduloj en la antikva socio

* * * *

En la ĉisuba esplorlaboro ni klopodis ĉirkaŭstreki la ĝeneralajn vivkondiĉojn de la blindulo dum Antikveco. Je kronologia vidpunkto la ampleksita periodo komenciĝas ekde la dua jarmilo A.K. kaj disvolviĝas proksimume ĝis la centa jaro de nia erao. Ni ankaŭ precizigu, ke ne venis al ni antikvulaj verkoj aparte dediĉitaj al la blinduloj. La informoj de la antikveca literaturo liveritaj estas fragmentaj kaj nur per komparkontrolado de ofte mallongaj aludoj oni sukcesas havigi al si bildon de la blinduloj dum Antikveco. Oni povas ankaŭ akiri informojn ĉi-rilate per ekstrapolado de freŝdataj, eĉ nuntempaj donitaĵoj pri la vidhandikapitoj en la Tria Mondo.

Nu, estas permesite konfesi, sub minimuma ereborisko, ke la sanstata situacio en Proksima kaj Mez-Oriento konis neniun fundamentan ŝanĝiĝon de la konsiderata epoko ĝis la komenciĝo de la nuna jarcento. Ne mirige do,ke la blinduloj estas ofte menciitaj en antikvaj literaturaĵoj ĝenerale, kaj en la Sanktaj Skriboj aparte. Sed antaŭ ol eniri tiun literaturĉapitron ni listigu la ĉefajn kialojn de blindeco.

LA FIZIKAJ KIALOJ- Dum en la nordaj landoj malvarmo ofte portas malvarmumon, tusadon kaj bronkiton, en la varmaj landoj la suno krude suferigas la okulojn. Tia fenomeno estas jam notita dum la dua jarcento antaŭ nia erao:" En sia tagmeza pozicio la suno sekigas la kamparon; kontraŭ ĝia ardo, kiu eltenus?...Ĝi blindigas la okulojn."

Nu, tro longa submetiĝo al lumego povas naski konjunktiviton; tiu inflamo, ne grava per si mem, kapablas atingi la tutan okulon kaj postlasi ulcerojn sur la korneo. Tiam ĉilasta iĝas maldiafana kaj proporcie malpliiĝas la vidakreco. La malpureco tiutempe reganta pligravigis tiun procezon. Ni ne forgesu, ke la homoj loĝadis sub la sama tegmento, kiel la bestoj, . Tio klarigas la ĉeeston de multnombraj muŝoj disportantaj ĉiuspecajn malpuraĵojn. Plie, la orientaj ventoj portadis el la dezerto sablon tiel maldikan, kiel faruno, kiu ĉien eniĝadis, inkluzive de la okuloj. La Readmono elmontras al ni tiun fenomenon, kiel plagon celantan al puno de malobeema Izraelo.

LA INFEKTAJ KIALOJ- Konjunktivito kaj ties malĝojigaj konsekvencoj estas ŝuldataj ne nur al la inflamo fare de fremdaj substancoj, aŭ al forta lumbrilo. Gravan rolon ludas la mikrobaj infektoj. Normale ili spontane malaperas. Ili tamen povas okazigi korneajn ulcerojn, kiuj siavice kaŭzas malpliigon de la vidpovo.Certe malsanon tiaspecan aludas Tacito parolante pri Aleksandria enloĝanto "fame trafita de vidputriĝo". En la helena lingvo "oftalmito" signas kaj konjunktiviton kaj blindecon de ĝi naskitan.

Supozeble jam konata en pra-Egiptio, traĥomo eĉ hodiaŭ estas unu el la plej gravaj kialoj de blindeco. La lepro, tiam tre komuna en Oriento, portas blindecon diversmaniere, ĉu per formiĝo de surkorneaj fadenetoj, kiuj malklarigas la vidpovon, ĉu per multobliĝo de Hansen-baciloj en la iriso. Fine lepro foje estigas vizaĝan paralizon, kiu malhelpas, ke la okuloj normale fermiĝu; tiam la korneo sekiĝas kaj ulceriĝas. La variolo, kiu dum la kvina aŭ sesa evolutago foje okazigas korneajn lezojn, estis kazo de blindeco.

MALJUNIĜO- Kiel nuntempe maljuniĝo estis foje akompanata de parta aŭ plena perdo de la vidpovo. La Biblio mencias plurajn homojn, kiuj perdis la vidkapablon maljuniĝante: Izaako, Jakobo, Elijo...

LA LEĜAJ PUNOJ- Ŝajnas, ke la rebata puno ĝenerale validis en la landoj, pri kiuj ni interesiĝas, laŭ diversaj formoj. La esprimo " okulon pro okulo, denton pro dento " estas fariĝinta la difino de tiu jursistemo. Kruela ĝi povas aspekti, tamen ĝi jam konsistigis plibonigon kompare kun la antaŭa regularo: "Se oni min batas, mi mortigas viron; se oni min vundas, mi mortigas

infanon. Se necesas mortigi sep virojn por venĝi Kainon, sepdek oni mortigos, por ke mi estu venĝita" (Genezo, IV, 23-24).

Tiaj principoj estis jam regantaj en Babilono sub la reĝo Hamurabo, kies fama kodo, nuntempe videbla ĉe muzeo Louvre, tekstas jene: "Se viro liberon ĝuanta trapikos la okulon de aristokrato, al li oni trapikoŝ okulon." La sekvaj artikoloj antaŭkalkulas malpli drastajn punojn (monkompenson), se la trapikita okulo apartenas al iu el malaltaj popoltavoloj aŭ al sklavo. Same la leĝaro de Eshnunna kaj de la Hititoj nur monkompenson antaŭkalkulis por trapikita okulo.

Prifosaĵoj en Uzi (Irako) ebligis, ke oni trafu tabelojn de la 15-a jarcento A.K. proksimume datumantajn kaj jurajn tekstojn; sur unu el ili legeblas kontrakto inter landa enloĝanto kaj virino, supozeble truddevigita sklaviniĝi. Estas tie menciite, ke se la virino ĝin malrespektos kaj forkuros de sia mastro, estos al ĉi-lasta permesite forŝiri de ŝi la okulojn kaj ŝin vendi, kiel sklavinon. En Pentateŭko montriĝas impresaj similaĵoj:" se iu alian homon vundos, saman vundon li ricevos: ostorompon pro ostorompo, okulon pro okulo, denton pro dento; la malbonon al alia faritan oni al li redonos."

Pli favora al la sklavoj estas la Mosea leĝo tial, ke ĝi ordonas konsenti liberon al tiu, kies mastro estos al li okulon trapikinta (Eliro 21-26). Konsiderante la historian kuntekston, oni tutprave demandas al si, ĉu la rebata puno ne estas tie starigita, kiel fundamenta juroregulo, tamen ne tutrigore aplikata

Helenio konis la saman regulon: Diogeno Laerco laŭdas la saĝo-plenajn decidojn de Solono (640-558 A.K.), la fama atena leĝodonanto, laŭ kies preskriboj" kiu okulon trapikus, tiu havu okulon trapikita"

MILITO- Estas facile imageble, ke dum la multnombraj bataloj antikvatempe okazintaj, multnombraj okuloj estis trafitaj de sagoj, lancoj aŭ ŝtonoj. Citeblas la ekzemplo de Antigono unuokula, kiu perdis okulon sekve de vundo. Homero rakontas kiel Patroklo mortigis Sebrionon, koĉeron de Hektoro, per ŝtono interokulen alĵetita. Sed plejunue la kondiĉoj al la venkitoj rezervitaj kaŭzis multajn blindiĝojn dum tiu periodo. Tempe de la Izraela reĝo Saul, Nahach starigis, kiel packondiĉojn, la rajton trapiki la dekstran okulon al ĉiuj unuopuloj loĝantaj en Yabech de Galaad. Flavio Jozefo, juda historiisto, 1-a jarcento de nia erao, klarigas al ni kial: " Ĉar la ŝildo kovris al ili la maldekstran okulon, ili ne plu povis en tia stato uzi la armilojn kaj estis nekapablaj militi".

Ankaŭ la Asirianoj blindigis siajn malamikojn alproksimigante al la okuloj pleton el arĝento aŭ alia metalo, ĝisblanke varman, aŭ perlance ilin trapikante.Bareliefoj prezentas la reĝon propralance trapikantan la okulojn de la kaptitoj. Ŝimŝon tiun kruelan sorton suferis, samkiel la reĝo Sedecias kontraŭ Nabudkadnecar ribelinte. Laŭ Herodoto la Scitoj aplikis la saman turmenton al siaj militkaptitoj. Suetono raportas, ke antaŭ ol ordoni lian mortigon, la imperiestro Aŭgusto propramane trapikis la okulojn de la pretoro Quintus Gallius, kiun li suspektis pri komploto.

DIA PUNO- La nuntaga leganto eble miros ĉe mencio de la dia mondo inter la kaŭzoj de blindeco. Sed jen ja preteratento pri la pensmaniero de la Antikvuloj, kiuj perceptis la mondon, kiel tutaĵon, laŭ senproblema kombinado de la naturaj, supernaturaj, mitaj kaj praktikaj elementoj. Tiel en Iliado, Homero rilatigas armean malsanon kun Zeŭso kolerigita pro ofendo al la preĝokomisiito. Estas vere, ke la helenaj filozofoj iom post iom mildigis tian pensmanieron, starigante distingon inter naturaĵoj kaj supernaturaĵoj, kio estis ebligonta la sciencan disvolviĝon. Aliaj, kiel Seneko, taksis blindecon, kaj malbenojn ĉiuspecajn, provĉagrenoj de Dio senditaj por hardi la karakteron de la elituloj, do bono. Tamen tiu nocio de punocela malsano regadas dum Antikveco.

"Edipo Reĝo", la Sofokla tragedio, trafe ilustras tiun procezon: pesto rabdetruas Tebon; la enloĝantoj venas al sia reĝo Edipo, kiu jam

liberigis ilin el aflikta situacio kaj petas, ke li ree faru ion por forigi la plagon. La oraklo de Apolono, konsultite por ekkoni la kialon de la malbono, respondas, ke venĝenda estas la murdo de Lajo, antaŭa reĝo de la urbo. La sekvo de tiu historio sciigas nin, ke la kulpulo fakte estas ja Edipo, kiu en nescio murdis la propran patron kaj edzinigis la propran patrinon. Tion ekkomprenante Edipo trapikas al si la okulojn. Sed lia blindeco estas ja la rezulto de tragika sorto anoncita de la divenisto Tirezio.

Fakte blindeco estas ofte rezulto de dia puno. En sia "Fedra", Platono prezentas Sokraton farontan refojan paroladon por repacigi la dion Eroso, pro timo, ke li estas lin ofendinta en antaŭa parolado. Per tia ago Sokrato elaĉetos sian kulpon antaŭ ol ricevi blindecon, kiel punon. Ĉar li memoras, ke la poeto Stesikoro seniĝis je vidpovo pro disfamigo de Helena, sed ke li ĝin reakiris en la tujo post verkado de palidonio. Samspeca rakonto troveblas ĉe Herodoto: iu faraono blindiĝis pro koleriĝo kontraŭ Nilo (taksata diaĵo), kiu tro abunde superfluis. En komedio sub titolo "Plutos", Aristofano uzas la saman skemon: li enscenigas la dion de riĉeco subtrajte de persono, kiun Zeŭso blindigis, ĉar nur bonulojn li vizitadis!

El tio ni vidas, ke malobei religian aŭ homan leĝon povis tiri blindecon, kiel punon. Ne mirige do, ke oni trovas, en la malbeno-vortoj kuŝantaj en la traktado, artikolojn por peti de la dioj, ke ili punu per blindigo tiujn, kiuj malobservus la tiel sigelitajn aliancojn. La traktatoj faritaj de la Asiriaj reĝoj Aŝurnirari la kvina (754-746 A.K.) kun Mati-Ilu el Arpad, kaj Esarhaddon (681-669 A.K.) kun siaj vasaloj, entenas tiaspecajn malbenojn: se ci perfidos la aliancon, "Shamash, lumo de l'ĉieloj kaj tero, forprenu de ci la vidpovon. En mallumego ci paŝu".

La Biblio entenas similajn kondiĉojn en la malbenoj, per kiuj Readmono finiĝas. Laŭ multnombraj eltiraĵoj Dio trafas per blindigo altrangulojn Lin kontraŭantajn.

Estus aliaj kaŭzoj de blindeco priskribindaj, sed nia celo estas paroli pri la plej tipaj troveblaj en la landoj, kiuj konsistigas nian studobjekton.

Verkis Alain Decoppet

Esperantigis Simone Boniol

****

La amdezir'

Verkis A. O. VINJE (norvega poeto)

Vi nepre devas kurbiĝi, vir',
al morta fin',
se estingiĝis la amdezir'
al bela in'.

Car tiam foriĝis el vigla ul'
la vir-valor'.
Forpasis la vivo en sia brul',
cindriĝis kor'.

Kaj tial pleje valoras por hom'
la kora sent'.
Kaj tial viro sopiras al am'
ĝis mortmoment'.

Se mankas al viro en lia viv'
elkora am',
li reaperantas en vana driv'
kvazaŭ pala fantom'.

Tradukis: Jon kaj Odd Tangerud

STRANGA SONĜO

KRISTOFORO KOLOMBO

EN LA KOSMO

Tute stranga estis la sonĝo, kiun mi faris! Imagu: mi vidis K. Kolombon, taŭge vestitan, pretan je vojaĝo al la luno; Ronsard, la dolĉa XVI-jarcenta poeto, ludis per ĵaz-trumpeto; Francisko la unua inaŭguris atom-centralon kaj L. da Vinci desegnis la planojn de nova elektronika maŝino.

Ankoraŭ impresita de tiuj strangaj noktaj fantomoj, mi, dum la tuta tago revidis ilin kaj serĉis la kialon de la eksterordinara enveno de tiuj renesancaj viroj en nian modernan mondon. Kolombo, la sentima naviganto, kiu dum monatoj iris sur la maro, ĉar li legis en la dua akto de "Mĕdée", ke ekzistas nova mondo promesita al la estontaj jarcentuloj. Ronsard, kiu, kvazaŭ per fluto, kantis la sentojn de siaj samtempuloj kaj ilian novan vivmanieron, ilian novan rigardon al la naturo, al la vivo, al la amo. Francisko la unua kiu, revenante el Italio, ŝanĝis la stilon de la kasteloj kaj malfermis Francion al la renoviĝantaj artoj. Leonardo da Vinci, kiu kuraĝe fidis la homon kaj faris por li planojn de maŝinoj, kiuj donos al la homaro liberon kaj potencon. Jes, ili estis homoj de la Renesanco, de la Nova Naskiĝo.

La Turkoj estis fermintaj la vojon al Oriento. Oni ne plu ĉerpis el la spiritualista Oriento sed el la mediteraneaj civilizoj, el tiu "antikva mondo", kiu tiom ŝatis la penso-liberon kaj la universalajn ideojn. La Okcidento malkovris Amerikon kaj Afrikon. Naskiĝis nova socia klaso: la komercistoj. Ek de tiu tempo, la vero ne plu venis de la ĉielo sed estis transdonata de homoj al homoj: la tera inteligento superis. Eŭropo orientiĝis al racionalismo. La "homa rajto" anstataŭis la "dian rajton". La maŝoj de la reto fariĝis pli larĝaj kaj ellasis la liberon. Fakte, Renesanco signifis malbaro de la emo al malkovro, al esplorado, al aventuro, al konkero, ligita al la antikva spirito.

Kaj nun mi komprenis mian strangan sonĝon: nia epoko estas nova renesanco. Ĉe la komenciĝo de la 20-a jarcento ĝi revenis al la tradicia penso, faris kvazaŭ pligrimadon al la fontoj de la religia spirito. La moderna scienco pridiskutas la strukturojn de la konoj ellaboritaj de post la 16-a jarcento. Ĉinio, Afriko, Hindio, la mahometana mondo vekiĝas kaj deziras trovi al si lokon sur la planedo. La konscio modifiĝas, ĉar la arkeologio, la paleontologio, la etnologio esploras la junan aĝon de la homaro. Same kiel la samtempuloj de Vinci kaj Kolombo ni penas kompreni la plej malnovajn civilizojn kaj sendas homojn al la nekonata universo. Ni sentas, ke tuta civilizo ŝanceliĝas. La limoj de niaj konoj ĉiuterenaj ekrompiĝas kaj, samtempe tremas la limoj inter la nacioj.

Jes, se Ronsard vivus hodiaŭ, eble, anstataŭ blovi tra fluto la dolĉon de nova libera mondo, li blovus tra trumpeto la zorgojn kaj timojn de popoloj novnaskitaj aŭ de leviĝantaj novaj sociaj tavoloj; Kolombo, se li estus 20-a jarcentulo estus akompaninta Gagarine aŭ Shepard en la kosmon; Francisko la unua fiere fidus la maltimajn modernajn arkitektojn, Vinci imagus novajn eksterordinarajn maŝinojn por viziti Saturnon aŭ Venuson.

Sed, kiel malfacila estas la vivo dum la transiro!

P.B.

Paĝo de la Geknaboj

KIAL KUKABURO RIDAS (2)

" Nun ni havas la benaĵon de fajro en la ĉielo, ni neniam permesos, ke ĝi pereu. Nokte, ĝi senfortiĝos, sed matene mi ekbruligos ĝin denove. Homoj nomos ĝin ' la suno '," diris Bajami, la Granda Spirito, " kaj je la ekflamo, ĉiuj vivantoj vekiĝos el dormo."

" Kio estas dormo?" demandis Punĝelo - " Estas tempo de ripozo, ne-vivado. Spirito fermas la okulojn de homoj kaj kvietigas la pensojn. Vivaj estaĵoj bezonas dormon por pluvivi."

Punĝelo kapneis. "Mi ne komprenas. Sed se vi diras, ke dormo estas bona, devas esti. Sed se homoj vivas, tamen ne-vivas, kaj tenas la okulojn fermitaj, ili ne scias, kiam la fajro brulas "

Bajami respondis:" mi pendigos brilan stelon sur la orienta ĉielo. Tio montros, ke lumo revenos al la mondo." - " Kiel ili vidos la stelon, se iliaj okuloj estas fermitaj?" - " Estos bruo, kiu vekos ilin." - "Kia bruo? Kiu faros ĝin?" - "Tio estos via tasko, Punĝelo. Vi devos trovi rimedon por informi ilin."

Punĝelo pensadis. " Eble mi portus ŝtonojn al la Lakta Vojo, kaj faligus ilin sur la terglobon... Sed la ŝtonoj povus vundi la estaĵojn. Kaj tia bruo povus teruri ĉiujn..."

Punĝelo malsupreniris al la terglobo kaj vagadis kampare. Li aŭskultis, aŭskultadis. Neniu sono kontentigis lin... Subite li aŭdis ridon. Li elserĉis ĝin. Kukaburo sidis surbranĉe kaj ridis ĝoje al si.

" Kukaburo!" kriis Punĝelo." Ĉu vi kapablas ridi pli laŭte?" Kukaburo malfermis la bekon kaj ridegis tiel laŭte, ke Punĝelo devis kovri la orelojn.



" Mirinde! Ĉu vi estas preta ridi tiumaniere, kiam Bajami pendigos la matenan stelon por averti la dormantojn, ke tagiĝos?"

" Kompreneble! Volonte! " diris Kukaburo. " Mi estas plej feliĉa, kiam mi povas ridi."

Onklino GINA

el AŬSTRALIO

Mi amas Vi

Tra la paca kamparo trajno fulmrapidis. Ekhalto sibla. Blok! - Kio!?
Ina vekiĝis abrupte. Sur ŝiajn genuojn ĵus falis valizo. Kaj malfermiĝis. Ne tute, sed sufiĉe por ke ŝi, ho terur'! vidu... Tuj la junulino estis ekstere, kuranta lokomotiven. Averti iun ŝi ja devas. "Heeeee! Haltu! Atendu min!" Vane ŝi kriis. La trajno jam rapidis for. Ŝi rondrigardis. Nur arboj, kampoj. Silento. Kion fari, se ne sekvi la relojn?

Angoro ŝin urĝis. "Kiel elturniĝi en ĉi tiu fremda lando por ilin savi?" Kvazaŭ responde hundo ie bojis, esperige.

Direktante sin laŭ la sono, la helpema, sed senhelpa, junulino baldaŭ ekvidis izolitan farmbienon. Ju pli ŝi proksimiĝis, des pli blekis la hundo. Senrezulte. Montriĝis neniu. Ŝi sentis emon plori. La penso pri la valizo turmentis ŝin. Kiel evitigi la katastrofon?

Trovinte vojeton, ŝi laŭiris ĝin, kiam motoro bruis malproksime.
" Eblos petveturi! Policejen." Ve! Estis klaktintanta traktoraĉo. Tamen.... Ŝi povis nur gapi: ĝin kondukis la Dio Amoro mem. Lia sunbrunigita atleta korpo diveneblis sub la ĉemizo duonfermita. Mire-admire li rigardis ŝin. Kaj ŝi lin.

La traktoro haltis.-"Tagabon! Kjon ve...?" Sed ŝi kapskuis nekomprene. Per gestoj ŝi provis indiki, ke ŝi deziras telefoni. Kapjesinte, li helpis ŝin grimpi apud lin. Ĉe skuo de la traktoro, ŝi ekkaptis lian fortikan ŝultron, sekurige varman, kaj restis alkroĉita al li ĝis ili atingis - tro rapide - la domon. Ankaŭ en li ŝia proksimeco kirlis nekonatajn sentojn.

Ĝoja bojado bonvenigis la junan farmiston, kiu saltis teren esperante helpi la knabinon, kio fakte okazis eĉ pli bele ol li revis: ŝi mole falis en liajn brakojn. Iliaj rigardoj renkontiĝis sed tuj sinĝene forglitis.

La embarasan silenton rompis nova bojo; la belulo iris malligi la hundon, kiu ĝojsaltis ĉirkaŭ li, petante, kaj ricevante, karesojn. -" Zaĉjo," li diris por prezenti la hundon, kaj aldonis sinkline:" i me...Adamo"- " Ina ŝi respondis, kun gesto al si. Ili kune karesis Zaĉjon, kaj iliaj manoj apenaŭ ektuŝiĝis, kiam krude sin trudis telefonsono. Adamo kuris enen. Sekvis longa telefona konversacio, por Ina tute nekomprenebla. Post kiam li finis, ŝi kaptis la telefonon kaj pete diris:

" Policon, bonvolu!" - " Bonvolu, bonvolu?" li ripetis kaj tuj aldonis:

"Esperanto?" - " Ĉu v...?" ŝi komencis, sed jam li kaptis ŝian manon kaj tiris ŝin kure supren. Tro surprizita por rezisti, ŝi sekvis lin en agrablan, sunluman dormoĉambron, en kiu atendis larĝa lito, komforte tenta.

Ne al la lito li sin direktis, sed al verda kurteneto, kiun li kvazaŭ solene flankenŝovis. Ege scivolema, ŝi alproksimiĝis kaj, kiam la ekrano de lia larĝa torso tion fine allasis, vidis... ho ĝoj'...tutan bretaron da esperanto-libroj . Ina baldaŭ trovis dulingvan vortaron, kiun ŝi rapide foliumis. Ŝia fingro haltis ĉe la vortoj "bombo", "en", "trajno".

En liaj okuloj ŝi legis miron kaj eĉ suspekton. Febre do ŝi plu serĉis, ĝis elvortarigo de du pliaj vortoj: "averti", "polico". Li momente restis senmova, fikse rigardante ŝin, dum videble en lia menso pensoj tromultis-tumultis. Kun petega mieno, ŝi kaptis lian manon kaj urĝe tiris lin telefonen, ripetante: "Polico! Polico!".

Post rapida fingrumado de tricifera numero, Adamo mitralvorte raportis en sia lingvo, por ŝi frustre nekomprenebla, sed iupunkte li silentis kaj atente aŭskultadis, pli kaj pli senpezigata. Li turnis sin al ŝi kun larĝa rideto,

kaj delikate, kvazaŭ tenere, metis la manojn sur ŝiajn ŝultrojn. Siavice li traserĉis la vortaron kaj montris: "polico", "trovi", "bombo".

-"Uf!" ŝi elspiris falante en liajn brakojn.

Paca somera vespero. Ina ripozas en la ĉambro de la esperantista avino de Adamo. Dume, antaŭ la frostegujo, la junulo hezitas: "esperantistino! Ĉu vegetaranino?" Sed lian menson trafas ege pli grava zorgo kaj li kuras vortaren.

Post nelonge, Ina desupras kaj , malsata, eniras la kuirejon. Adamo forestas, sed ronronas mikroonda forneto apud la tegita tablo, belete aranĝita kun florbukedo.

-" Kia aminda knabo!" ŝi diras al si, kaj tuj rimarkas, ke sur unu el la teleroj kuŝas karto kun zorgbela skribo:

MI AMAS VI

Kaj jen envenas Adamo. Ridetante ŝi montras la karton kaj diras:

-"Ne! Ne!"

Vidante la konsternitan mienon de Adamo, ŝi tuj haltas, prenas la karton, premas ĝin al sia koro kaj kisas ĝin kun esprimplena mimiko.

-"Mi amas vinnnnnnn", ŝi korektas.

-" Vin?" li ripetas kun duba tono.

Serĉinte en la vortaro li ĝoje signas komprenon kaj eliras.

Kaj triumfe revenas post minuto kun botelo da vin'!

Tiu rakonto estis verkita en Gresillon, de

grupo da staĝanoj gvidata de Claude Piron.

(legu paĝon 15)

::

Ĉu vi scias, ke . . .

la kalao estas long-beka birdo, kiu vivas en la sud-oriento de Azio.Kiam alproksimiĝas la periodo de ovdemeto, la paro serĉas truon en arbo-trunko. La femalo ennestiĝas en la trunko kaj ŝtopas la truon per siaj fekaĵoj. Ekstere ankaŭ la masklo ŝtopas la truon per koto, kaj rezino. Nur trueto en tiu muro sufiĉas, por ke la ino ricevu nutraĵon Dum du monatoj la femalo kovas kaj la masklo nutras ŝin. Kiam eloviĝis la idoj la patrino frakasas la muron per sia beko.

la rano "vaquero" (vakero), malgranda, vivas en Sud-Ameriko. Post fekundigo de la ovoj, la masklo glutas ilin kaj konservas ilin en speciala "poŝo" interne de sia korpo. Kiam la eloviĝo okazas la patro "regurgitas" la etajn ranidojn.

la akuŝ-bufo maskla eltiras ovo-stringon el la kloako de la femalo kaj volvas ĝin ĉirkaŭ siaj malantaŭaj kruroj. Li same agas kun aliaj du femaloj. Li restas en humida herbo ĝis la eloviĝo, kiam li metas la ovojn en lageto aŭ rivereto.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAUA ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	D	U	M	V	I	N	T	R	E
2	E	K	A	R	T	O	■	I	P
3	F	■	N	I	R	V	A	N	O
4	I	M	U	N	I	G	■	I	K
5	N	E	■	G	A	V	O	T	O
6	I	S	K	I	■	I	N	O	■
7	T	I	A	■	O	N	I	■	E
8	I	N	T	E	R	E	S	A	S
9	V	■	E	J	■	A	K	R	E
10	A	S	T	R	O	N	O	M	O

NOMBRA ENIGMO

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 65 literoj. La ŝlosilvortoj estas:

26-6-14-10-27-22-34-15 : orientazia lando.

20-17-31-32-47-59-49-19-29-39 : fervoja bilet-kontrolisto.

8-20-13-35-32-4-41-25-36-21-55 : norda landaro

61-38-37-43-51-52-53-54-15 : jarparto

1-29-17-53-30-46-19 : laktaĵo

28-24-63-33-58-9-39 : grandegulo

16-2-3-9-53-45-27-49-7-18-55 : objekto de sinjorinaj revoj.

5-50-14-42-12-15 : kapkovrilo

11-60-44-64-40-38-17 : oficista enspezo.

23-62-28-4-48-53-22-31-32-19 : vira homo

57-59-56-16-29-2-65-39 : rapidega vagonaro.

1...65 : malnova ĉina proverbo; tre stranga, sed eble prava.

LA VIVO EN GRESILLON

SEMAJNO PLEJ RIDOPLENA

Sub la titolo "Ĉu verki Valane?" en Greziljono okazis dum la unua semajno de aŭgusto staĝo gvidata de Claude Piron kaj rilata al verkado. La celo estis duobla: 1) lerni ekhavi ideojn kaj organizi ilin; 2) lertiĝi en la arto kiel eble plej belstile esprimi sin.

Estas malfacile diri, kiagrade tiu celo atingiĝis. Sed la konstanta ridado de la partoprenantoj certe efikis plej sanige al ĉiuj. Fakte, unu el ili lastatage diris: "Tian staĝon Sociala Asekuro devus repagi".

Ni procedis jene. Je la unua renkontiĝo ni decidis, ke ni grupe verkos novelon, ke por ties kunplektado ĉiu povos proponi siajn ideojn, kiujn ni demokratie akceptos aŭ forĵetos, kaj ke ni ne konstruos unue planon de rakonto, kiun ni poste vortigu, sed komencos la enfrazigon tuj post la unuaj ideoj, lasante al ĉiu momento la eblon beni nin per freŝaj inspiroj, eĉ se tiel iom post iom produktiĝos novelo tute malsama ol ni komence imagis.

Je tiuj decidoj ni tenis nin dum la tuta semajno. Tuj post kiam la grupo alprenis ideojn, ni ilin vortigis. La kursgvidanto skribis sur la nigra/blanka tabulo, kion la staĝanoj diktis. Kaj same demokratie kiel pri la "intrigo", ni per plimulto decidis, kiun vortigon ni konservos.

Se precizigi, ke la nombro da partoprenantoj variis laŭ la duontagoj inter 15 kaj 20, estas senutile diri, ke tia farmaniero ne estas rapida. Sed ĉiuj partoprenantoj povas atesti, ke ĝi stimulas ridadon. Ideoj ŝprucis konstante, kaj ili ofte estis tiel fantaziaj, ke ili tuj vekis eksplodon de gajeco. Simile, la proponoj de vortigado ripete devigis nin ridi, tiel amuzaj ili multfoje estis. Ke la komuna verkado montriĝis okazo lerni pli pri gramatiko, vortprovizo, vortfarado aŭ stilo, tio estis kroma frukto de kunlaborado aparte ĝoj-etosa.

Oni trovos aparte kopion de la monstro, kiu rezultis el la maldoloroj de tiu akuŝado. Por iu, kiu ne partoprenis, ĝi verŝajne ne povas plaĉi, eble ĝi eĉ estas nekomprenebla. Oni ne konfuzu ekzercado kun serioza provo atingi rezulton. Sed oni sciu ankaŭ, ke sen ekzerciĝo neniu majstro fariĝas. Kaj se la ekzerciĝo estas liberige gaja, nu, des pli bone, ĉu ne?

La gvidinto



JAM EN NOVEMBRO

petu nian programon por 1989.

Esperanto-Domo Gresillon, F-49150 BAUGE

KOMITAT-KUNVENO de 26/06/88-

Ĉeestis: s-inoj Lenel kaj Vincent, s-roj Babin D., Babin P., Chevalier, Boyet F., Boyet H., Benistant, Lagrange, Dairon. Senkulpiĝis: s-inoj Bourrot kaj Lenel.

La tagordo koncernas ĉefe la nuna stato de la someraj staĝoj, kaj starigo de provizora programo por 1989.

Dum la unua (junia) staĝo ĉeestis 30 personoj, do iomete pli ol lastjare. Por la juliaj kaj aŭgustaj staĝoj ankoraŭ alvenas informpetoj kaj aliĝoj. Estas malfacile diri jam kiom da personoj estos akceptitaj. La nombro por julio kaj la unua semajno de aŭgusto estas nun proksimume 50. En aŭgusto tiu nombro tre verŝajne falos. Koncerne la ekskursoj estos denove malfacile organizi perbusajn vizitojn, sed estos eble starigi peraŭtajn komunajn veturadojn. Ŝajnas, ke la malpli ol 30-aĝuloj retrovis la vojon al Gresillon. Ili ĉijare estos pli multaj ol la antaŭajn jarojn. Zorgos pri la administrado de la staĝoj s-ino Lenel kaj ge-sroj L. kaj P. Babin. D. Baron helpos koncerne la infanojn kaj administradon. Gvidos kursojn: E. Abramowska, A. Childs-Mee, P. Grzybowski, D. Keefe, J. Laporte, R. Lloancy, D. Moirand, C. Piron, C. Roux, J. Vincent. Prelegos: B. Cheverry, R. Lloancy, P. Métivier, F. Roose, O. Tangerud.

Finfine la verando estas tute renovigita. La duŝejoj de la unua etaĝo estis refarbigitaj kaj sistemo por pli bona ventumado estis instalita. La ĉambro 26 estis refarbita. Ok blankaj ĝarden-benkoj estis aĉetitaj dank'al speciala donaco de nederlanda amikino.

La komitato nun diskutas pri la venontjara programo. Komence de aprilo okazos la kutimaj Infan-renkonto kaj Pedagogia staĝo. La somera kalendaro estos dividita en kvin staĝoj de po du semajnoj. Dum ĉiu staĝo okazos la kutimaj diversnovelaj kursoj. La ekzamensesio okazos devige la lastan tagon de ĉiu staĝo. Dum la unua staĝo de julio estos prezentitaj diverstemaj prelegoj. Unu semajno de la dua parto de la monato estos dediĉita ankaŭ al kelkaj prelegoj pri la Franca Revolucio. Dum la unua staĝo de aŭgusto oni omaĝos al Edmond Privat.

Post la anonco de la eksiĝo de la prezidanto en 1989, neniu anstataŭanto sin prezentis.

La kunveno finiĝis je la 15-horo.

La sekretario: G. Dairon

LIBRO-SERVO

Jam nun, pensu pri viaj finjaraj donacoj. Por viaj korespondantoj, elektu belan libron, ekz. " La Normandaj Rakontoj " (36 ff.) Tria ekzemplero senpaga! Petu la katalogon kontraŭ poŝtmarko.

Por loki sur niajn bretojn la novaperintajn verkojn, ni brokantas kelkajn pli malnovajn eldonaĵojn. Petu liston kontraŭ afrankita koverto al S-ino J. VINCENT, B.P. 54, 49150 BAUGE

Pensu ankaŭ pri niaj

PERKORESPONDAJ KURSOJ

(tri niveloj)

Informojn donas: Esperanto-Domo, Gresillon, 49150, Baugé.

LOUIS CHASSERIAUD forpasis en junio. De pluraj jaroj li ne plu vizitis Gresillon pro sia aĝo. Sed liaj amikoj certe memoras lian afablecon kaj lian klerecon. Al lia edzino la komitato de la esperanto-Domo sendas siajn kondolencojn.

NIA KONKURSO

Jen la tria parto de nia konkurso. Aperos la kvara kaj lasta parto en la decembra numero. Se vi ne sendis la respondojn post la apero de ĉiu numero de la revuo, vi rajtas atendi la aperon de la kvara serio kaj sendi la kvar respondojn samtempe plej malfrue antaŭ la 15-a de februaro 1989.

Ni memorigas, ke la premioj estos :

1) 1 000 ff. por restado en Gresillon.

2) 500 ff. por restado en Gresillon.

3) 200 ff. por aĉetado de libroj ĉe nia libro-servo.

4) 100 ff. por aĉetado de libroj ĉe nia libro-servo.

5) 50 ff. por aĉetado de libroj ĉe nia libro-servo.

TRIA SERIO

1 — Trovu la respondojn. Facila ekzerco por la leganto, kiu atente legis tiun numeron de Kulturaj Kajeroj :

— Kial oni povis diri, ke Aristotelo estis la patro de biologio ?

— Kiu malfermis Francion al la renoviĝantaj artoj ?

— Kiu verkis la rakonton « Mi amas vi » ?

— Kial oni foje trapikis la dekstran okulon de la malamikoj ?

— Kiu, jam fine de la antaŭa jarcento, alvokis la Kubanojn al liberiĝo ?

2 — En tiuj kvin titoloj de libroj mankas la vokaloj. Bonvolu kompletigi la titolojn kaj trovi la nomojn de la verkintoj, kies komencliteroj estas donitaj :

— L ND VR	G. S.
— L DRJ D MT	C. F.
— L ĜRDN D L RBSTR	L. G.
— SR KMP GRNT	I. N.
— PRNTMP N L TN	J. B.

3 — Mi estas urbo. Kiu mi estas ?

Mi estas la naskiĝ-urbo de pluraj konataj pentristoj.

Mi trifoje akceptis centojn da esperantistoj.

Granda rivero alportas al mi novaĵojn el la tuta mondo.

Laboro grava por la esperantistoj estas farita ĉe mi.

4 — Vera aŭ ne vera ?

— La Vivo de Lanti estis verkita de Barthelmes.

— La esperanta traduko de La Dia Komedio estis publikigita en 1963.

— La Centra Oficejo de UEA translokiĝis al Roterdamo en 1956.

— La unua numero de Kulturaj Kajeroj aperis en 1965.

— CDELI signifas Centro de Dokumentado kaj Eksperimento pri la Lingvo Internacia.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7.00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 300 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DENHAAG poŝtkonto : 39743.

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — No C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN